

Boulogne sur Mer
31, Boulevard Mariette

la 29^{an} de Aug. 1924

Tre kara Doktoro,

Fine mi alvenis hejmen post preskaŭ tri bonaj semajnoj en Zuricho kun mia edzo.

Mi ne povis skribi antaŭe ĉar kiam oni libertempas + ekskursas sur montoj kun edzo, ne estas oportune skribi al Esp. korespondanto, des pli ke mi tiel bone volas klarigi al vi kiel mi serĉis + serĉis vin Sabate vespere + Dimanĉon matene.

Ĉu vi memoras ke mi sidis antaŭ la bufedo, la vesperon de l'interkonatiĝa vespero, apud D^{ro} Sos + la L.K.K. de Nürnberg (kiun mi konas) Orthal + Lederman k.t.p. + vi malsupreniris la ŝtuparon + diris al mi ke vi ĉeestas koncerton? Post tiu koncerto, mi serĉis vin vane por pasigi la vesperon en kafejo aŭ alie. Mi ne amuziĝis en tiu interkon. vesp. Tute tute kontraŭe, cetere, estis same dum la tuta Kongreso.

Dimanĉon, mi sidis je la 2^a rango en la salonego tute apude de la estrado. Dum la interakto, mi eliris + promenis serĉante vin – sed vane. Mi adiaŭis aliajn amikojn, ne tre ĝoje, demandante min, la tutan tempon ĉu mi eble ne plu¹ bone estus farinta, restadi ĝis la fino de l'Kongreso – sed estis tro malfrue. Mi jam telegrafis al mia edzo + al hotelo en Zurich + plie mi estis malsana + malŝatis la tutan Kongreso². Kia malsimileco kun la Praha Kongr.!!! Do, kun bedaŭro en la koro, mi forlasis la Kongresaron Dimanĉon, je la 13^a, manĝis kun D^{ro} Broder en Rathauskeller + iris la hotelon Hammverand³ fari miajn pakaĵojn + adiaŭi S^{inon} Zamenhof. D^{ro} B. ĉiam sindonema kondukis min al la stacidomo + envagonigis min. Mi forlasis Wien je la 18^a + alvenis Zurichon je la 15^a la morgaŭan tagon, ne tre ĝoja, mi povas certigi vin. Mia edzo ne ricevis la telegramon ĝusta tempe + nur alvenis la mardon en Zurich, ĉar mi telefonis al li en Genevo. Post lia alveno, mi pli bone fartis, manĝis + dormis pli bone.

Mi tiel bedaŭras ke mi ne adiaŭis vin ĉar mi tiel deziris vidi vin iom pli + mi eĉ ne povis pasigi la interkonatiĝa⁴ vesp. kiam mi restis sola + eĉ ne diri⁵ al vi: ĝis la revido. Sed, mi esperas ke tio ne malhelpos la Esp. interkorespondado nia⁶ kiu ĝis nun, kvankam ne tre ofta, estas tiel ĉarma.

Ĉu vi memoras S^{inon} Guerra el Meksikujo? Ŝi alvenos post 1/4 da horo ĉi-tien por pasigi du tagojn ĉe ni antaŭ ol enŝipiĝi ĉi-tie por Meksikujo. Ŝi same elŝipiĝis + restis en Boulogno ĉe ni, en Majo + fine forlason Eŭropon por retrovi la edzon, kiu, li, alvenos Eŭropon en Oktobro por 2 monatoj + ankaŭ restos ĉe ni. Li interesigas min pli ol ŝi, ĉar mi korespondis kun li de 6 jaroj 1/2. Mi nun havas de li 128 leterojn!

Mi rememorigos vin al S^{ino} Guerra.

Ĉu la Kongreso plaĉis al vi? Vi ŝajnis ĉiam ĉirkaŭita + ne ŝajnas enuiĝi. Pri tio, mi ĝojas se estis tiele. Mi tute havis malbonan impreson + mi ne estis feliĉa, la tutan tempon. Mi iom koleriĝas nuntempe kiam mi pensas al ĉio kion mi estus povinta vidi. Mi vizitis nenion, vidis nenion. Feliĉe ke mi jam konis Wien. Mi multe pli ŝatis la Esp. kunvenojn en Salzburgo antaŭ la Kongreso – pli intimaj + almenaŭ oni povis sin retrovi unu la alian. En Zurich ankaŭ kun mia edzo, posta la Kongreso, ni ĝuis agrablajn Esp. vesperojn en kafejoj kun samideanoj reveninte de la Kongreso + kun Zurichanoj.

Kia taŭga bela urbo por la Kongreso. Oni parolas pri neoficiala renkontiĝo, kongreseto en Zuricho en 1925 + la oficiala Kongreso en 1926 en Skotlando.

Kiel via edzino povas esti feliĉa ke ŝi ne iris al tiu Kongreso en Wien tiel malbone aranĝita, kie oni donis nenion al la Esp. por ilia mono. Nur kabaredo + kabaredo. Mi ne iris, kaj vi?

¹ pli

² Kongreson

³ Pri la nomo de la hotelo mi ne certas

⁴ interkonatiĝan

⁵ diris

⁶ Interkorespondadon nian

Nun, kara D^o mi forlasos vin, salutante vin tut'kore kun miaj profundaj bedaŭroj ke mi ne sukcesis vidi vin pli.

Salutojn al via edzino

Ĉiam same

Alice Sergeant

Mi multe ŝatus scii ĉu vi pli ĝuis la Kongreson poste + kion vi faris.

Manskribita noto:

Zodp. 2/9/24